


starto★



Organo de Ĉeĥa E-Asocio - Orgán Českého esperantského svazu
Jaro tria N-ro 4 Julio-Aŭgusto 1970



Realismo kaj sciencoco – temo de la 55-a Universala Kongreso

La 55-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Vieno de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto 1970 en la ĉeesto de ĉirkaŭ 2000 reprezentantoj de la E-movado el 46 landoj. Ĝi memorigis la 25-an datrevenon de la fondiĝo de UN kaj pritraktis kiel ĉefajn temojn la rolon de la Internacia Lingvo kiel instrumento por edukado al internacia konceptado de la mondo kaj la esencajn trajtojn de la lingva problemo en la scienco.

Per inspiraj vortoj malfermis la kongreson la ŝtatprezidento de Aŭstrujo, d-ro Franz Jonas, kiu instigis la esperantistojn pensi realisme kaj varbi per novaj rimedoj, fidante pli la propran forton ol oficialajn funkciulojn.

El 16 oficialaj registaraj reprezentantoj pluraj, inter ili

ankaŭ tiu de Usono/interese! salutis en la Internacia Lingvo. En la nomo de la ĉs. ambasadejo en Vieno parolis František Pa-
zúr, ambasada konsilisto. Antaŭ la mikrofono alternis entute 31
reprezentantoj de la landaj asocioj, el tio 26 de la aliĝintaj
al UEA kaj 4 de landoj sen organizita movado.

Por la Ĉs. Esperanto Federacio salutis la kongreson Drahomír
Kočvara. Li informis pri aniĝo de ĈEA al UEA - kun 1100 membroj.
Komitatanoj de UEA iĝis J. Vitek kaj D. Kočvara,

Aliaj membroj de la oficiala ĉs. delegitaro estis P. Rosa por
AE SSR, F. Sviták por ĈEA kaj T. Balda por la MEM-sekcio de ĈEA.
Karavanon el nia lando kompletigis 31 individuaj delegitoj, plej-
parte el ĈSR.

Prof. Lapenna, prezidanto de UEA, en sia festparolado akcentis
decidan rolon de komuna lingvo en la procezo de integriĝo kaj
alvokis ĉiujn esperantistojn, E-organizaĵojn kaj instancojn a-
pliki kiel eble plej efikajn sciencajn metodojn en ĉiuj siaj
klopodoj kaj agadoj por disvastigo de la Internacia Lingvo. Ĉi
tiuj devizoj manifestiĝis same en ambaŭ rezolucioj akceptitaj
de la kongreso.

Mondpaca Esperantista Movado okazigis dum la kongreso sian
konferencon, kiu elektis internacian komitaton de MEM kun ĝene-
rala sekretario s-ano T. Balda. La konferenco akceptis rezolu-
ciojn pri Vietnamio, Mezoriento kaj eŭropa sekureco kaj sendis
saluttelegramon al la konferenco SALT en Vieno. Okmembra dele-
gitaro faris memroviziton al la tombo de A. Balague en St. Pölten.

DŮLEŽITÁ OPATŘENÍ ČES

Ze zasedání 4. pléna svazu

V souvislosti s odvoláním me-
zinárodního kongresu IKUE-KELI
a k zajištění další činnosti
svazu, učinil ÚV ČES na svém po-
sledním zasedání, 4.7. v Opavě,
tato opatření :

a/předsednictvo projedná o-
pět organizační řád všech sek-
cí svazu a připraví na další
zasedání ÚV případné změny a
doplňky,

b/veškerá činnost sekcí i EK
musí být předem schválena před-
sednictvem ÚV. Při organizování
táborů, setkání a jiných akcí
musí být program schválen pře-
dem. U kursů nutno nahlásit vy-
učovací plán i složení učitel-
ského sboru, tak, aby byla zaru-
čena jazyková úroveň vyučování.
Počítá se také se zavedením ně-
kolika hodin politické výchovy,

c/jakákoliv ediční činnost
podléhá předchozímu schválení
pedagogické sekce.

☐ Telegraficky ze sekretariátu

Dne 15. července nastoupila do
funkce adm. pracovnice ČES Ly-
die Klegová.

Stav platících členů svazu k
17.8.1970 je 1558. Členských le-
gitimací bylo vydáno 1915. Z to-
ho vyplývá, že více než 300 loň-
ských členů neobnovilo přispě-
vek na letošní rok. Vyzýváme pro-
to všechny funkcionáře, aby u
svých členů provedli kontrolu.

Člen svazu, který bude mít le-
gitimaci s číslem 2000, obdrží
jako odměnu bezplatné členství
na dalších pět let a knižní dá-
rek. EK, jehož prostřednictvím
se tento člen přihlásí, obdrží
rovněž knižní dar a v příštím
roce po pěti výtiscích STARTA
zdarma.

"SVĚT NENÍ MOUDRÝ"-propagační
esperantský letáček /dvě stra-
ny, rozměr listu 21x15/. Vydal
Český esperantský svaz, rozesílá
sekretariát svazu.

Sur la fruntpaĝo: Prezidento Jonas kaj Ivo Lapenna ĉe la mal-
fermo de la 55-a UK en Stadthalle, Vieno.

Ze života kroužků

BRNO - EK rozeslal k 1. září téměř 3000 letáčků "Svět není moudrý" na všechny brněnské školy, domovy mládeže, internáty, ústavy, instituce, redakce a mnoho set jednotlivců. V akci se bude nadále pokračovat.

HRADEC KRÁLOVÉ - Jak jsme již informovali v posledním čísle, ve východočeské metropoli pracuje od dubna nový kroužek, který vznikl sloučením dosavadního EK a kroužku při ČSD. Předsedou nového Klubu esperantistů ČSD při ZV ROH žel. st. Hradec Králové je Z. Matyková, místopředsedou B. Kompošt, tajemníkem M. Hromas.

KOPŘIVNICE - EK při ZK Tatra má již 31 členů ČES. Padesátihodinový kurs pro začátečníky ukončilo 10 kursistů. EK uspořádal rovněž dvě přednášky, které vyslechlo 70 osob.

MILETÍN - EK "Bukedo" má již osm platících členů svazu. Kursů se zúčastnilo na dvacet lidí, většinou mladých. Nejúčinnější propagace dociluje kroužek prací na vývěsní skřínce u zastávky autobusu.

OSTRAVA-VÍTKOVICE - V první polovině roku probíhalo vyučování v kursech A-D za účasti téměř 80 osob, z nichž závěrečným zkouškám se podrobilo celkem 29. Kroužek uspořádal 6 přednášek o cizích zemích, dvě k výročí V. I. Lenina, a spolu pracoval na propagaci Fotosalonu 1970. Vydal a rozeslal na 2000 pohlednic v esperantu, propagujících výstavu Ostrava 70.

PŘÍBOR - Na zdejší ZDŠ absolvovalo dětský kurs esperanta koncem května pět žáků. O měsíc později skončil i kurs pro mládež. Oba proběhly v rámci činnosti Klubu pracujících, kde byl promítnut film "Oslo", uspořádána přednáška "S esperan-

tem po Evropě" a při knihovně klubu založena "esperantská knihovnička".

VSETÍN - Koncem června skončil kurs pro začátečníky; z patnácti přihlášených vytrvalo devět, zejména mladí ve věku 12-19 let. Kroužek vydal obálky a dopisní papíry v nákladu 3000 ks a dopisnice ve stejném množství. Knižní služba dodala téměř 2000 esp. příruček a knih. Zájemci, napište si o seznam! 17.9. uspořádá EK veřejnou oslavu J. A. Komenského, o jehož díle promluví dr. R. Horský. O tři dny později začnou podzimní kursy pro mládež a dospělé.

Vsetínský kroužek navrhuje ČES a ZE SSR uspořádat ve Vsetíně společné setkání esperantistů obou svazů koncem r. 1971.

Osobní kronika

Ing. František S v i t á k, dlouholetý funkcionář našeho hnutí, předseda někdejšího Čs. esperantského výboru, nyní místopředseda ČES a hlavní delegát UEA pro ČSSR, oslavil 30. července své šedesátiny.

Vuk E c h t n e r, předseda Jazykové komise ČES, jeden z průkopníků esperanta mezi nevidomými, pedagog a známý překladatel, se dožil 10. července 65 let.

Ing. Jaromír Ř e b í č e k z Havlíčkova Brodu dovršil letos padesát let práce v esp. hnutí.

Naše řady opustili :

Karel Š o l c, jeden z nejaktivnějších esperantistů u nás, spoluzakladatel Letní koleje esperanta v Doksech,

Ing. Jaroslav Ž a l u d z Brna.

SCHÁZÍ VÁM UČEBNICE pro začátečníky? Ihned si objednejte: Učebnice esperanta, SPN Bratislava. Dobírkou za 16,50 Kčs zašle P. Rosa, Vlčková 46, Bratislava.

Somera bilanco

■ Denove en Opava. Jam la duan fojon kulminis esperantista aktiveco en silezia kulturcentro. Antaŭ tri jaroj omaĝe al la jubileo de P. Bezruč, nun okaze de la 200-a datreveno de la naskiĝo de L. van Beethoven.

Ĉirkaŭ 150 samideanoj kunvenis por la II-a Esperantista Kultura Festivalo inter 3-7a de julio. Venis ankaŭ reprezentantoj de landaj asocioj el Pollando, Hungario kaj GDR. Festparoladon pri la eminentulo prezentis muzikologo d-ro Malura. Sabato 4.7 okazis plenkunsido de ĈEA, eklaboris ankaŭ pedagogia, teknikista sekcioj kaj tiu de IKUE-KELI. Ĉe arta vespero prezentigis precipe membroj de Silezia teatro en Opava.

Neforgeseblajn impresojn oni rikoltis dum la ekskurso al Hradec, kie troviĝas muzeo de la granda komponisto. En solena kvieto de la kastelo eksonis tonoj de Beethovenaj komponaĵoj/plenumis Kvarteto de Radio-Ostrava/. Artistoj el Opava kaj de aliloke preparis per siaj programeroj - parte ankaŭ en Esperanto - tre belajn momentojn al ĉiuj partoprenantoj.

Lunde okazis tuttaga ekskurso al kelkaj memorindaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo: Fulnek /muzeco de J. A. Komenský/, N. Jičín, Příbor /kun monumento de pioniro Th. Čejka/.

ER ĉe Uzina klubo de Ostroj en Opava jam nun antaŭvidas okazigon de la 3-a festivalo en 1974 honore al 700-jara jubileo de la urbo. /knl/

■ SET Lančov. Antaŭ ĝi okazis seminario por funkciuloj de la E-junularo kun partopreno de 17 gejunuloj el Brno, Mělník, Opava kaj Třebíč. Poste sekvis la lavango de la unua etapo nombranta 170 homojn. Admirinda estas, ke du kuiristinoj kapablis nutri tiun amason dum du semajnoj sen plendoj kaj grumblado ambaŭflankaj.

Entute 146 anoj en la 1-a kaj 61 en la 2-a etapo partoprenis kursojn sub la gvido de la ĉefinstruistoj J. Vitek kaj Ing. Z. Polák. El alilandaj frekventintoj ni notu: 6 danoj, 3 italoj, 1 nederlandano, 4 svedoj, 1 hungaro, 1 greko.

La vesperoj estis dediĉitaj al prelegoj kun lumbildoj pri vojaĝado, kaj "meĥeĥe", spe-

Antaŭ kvardek jaroj

En la malgranda vilaĝo Nemuř, distr. Domažlice/okc. Bohemio/ estis la 6-an de julio inaŭgurita monumento por sep viktimoj de naziismo.


Post la solena raporto de la prezidanto de Distrikta Nacia Komitato oni legis poparte komunuman kronikon ĝis la jaro 1945. Estis agrable aŭdi inter aliaj historiaj datoj ankaŭ pri Esperanto kaj pri fondiĝo de la laborista ER "Nur volu". La prezidanto menciis Esperanton kiel tiaman gravan eron en la vilaĝa kultura vivo, kiam pere de la poŝt-oficejo kaj ĝia poŝtisto la vilaĝeto kontaktis kun la tuta mondo. La rondeto, kiu naskiĝis en 1925 kun siaj dekdu membroj kaj frunte kun la jam mortinta Václav Šuh sukcese ekpaŝis, havante bonan konkurencon en la najbara germana laborista E-rondeto "Matenruĝo" en urbeto Holýšov. Tiam jam komenciĝis praktika uzado de la internacia lingvo inter du nacioj.

Montriĝis bonaj ŝancoj por vigla laboro, sed malfeliĉe venis ekonomia krizo kaj multaj el ili devis serĉi laboron en diversaj partoj de la lando. Tio kaŭzis ankaŭ pereon de la klubo.

Václav Lorenz

JAN DRDA KIRASROMPILO

/El la novelkolekto "Muta barikado"/



ankoraŭ multo mankis ĝis la horbato de la dekdua, sed la patro ĉe sia ŝraŭbotenilo jam iel strange skuetiĝis kaj sin agitis. Kvazaŭ tiklus lin printempo, pensas Pepík, sed daŭrigas la fajladon, konigante nenion, nek indignante kontraŭ la patro. En Prago regas gaja humoro, hieraŭ vespere gestapanoj pafadis super la kapojn de homoj, oni deŝiradis germanajn nontabulojn, vivuis kaj poste kriis "fi!", "malhonoroni!", "pereu la faŝismo!", tramvagonajn elpendaĵojn oni ĵetadis en Vultavon. Pepík ĉeestis preskaŭ ĝis la noktomezo. Kaj irante fine dormi, li timis nur unu aferon: ke la krako okazos sen li, ke la definitiva ĝojego ekestos, antaŭ ol liaj okuloj matene malgluiĝos. Tamen la sabata mateno estis premaera kaj trankvila, kaj la patro enpelis Pepíkon en la metiejon, kvazaŭ temus pri ordinara labortago.

Ha, kiel terure malvigla antaŭtagmezo!

En la mallarga malnovurba strato, kie troviĝas la seruristejo de la patro de Pepík, pasas la vivo tre malrapide. Nur kelkloke legomvendisto aŭ tajloro staras sur seĝeto antaŭ sia malgranda butiko kaj per lesivo forlavas la germanan surskribaĵon de sur la vitro. Homoj primokas lin, ke li fordormis la hieraŭan tagon, ke tio ĉi estis farena jam antaŭ longe, ke per lavado estis la tempo hieraŭ, ke hodiaŭ oni jam nur pendigados. La legomvendisto, turnante la vizagon al la vitro, venĝe vidigas al ili sian dikan postajojn.

Huí, huí, fajfe laŭkuras la fajlilo de Pepík la feron. Ĉu la afero jam okazos? Ĉu jam okazos ĝi? tiu penso obsedas la hirtan kapon de Pepík, kaj lia animo estas plena de maltrankvilo, ke li tamen malfruigiĝos. Subite sur la tablo de la patro, kie inter fajliloj, universalaj ŝraŭbiloj kaj alia malpurigita ilaro kuŝas korespondaĵoj kaj mendokartoj, ektintas telefono.

"La seruristejo de Hošek," diras la patro mekanike en la parolilon, sed poste li profunde eksilentas, pro ekscitigo englutas la salivon kaj per voĉo tute aliigita ekkrias: "Ĉu vere? Mi tuj venos!"

Li batmetas la auskultilon kaj klopodas trovi la ĉapon, saltas al la larĝa lignotabulo, per kiu estas garnita la malantaŭa muro de la metiejo, en malvastan fendon li pene enŝovas siajn mallongajn stangetformajn fingrojn kaj faras ŝiron, preskaŭ malkonstruante la tutan domon. La deŝirita tabulo brue falegas sur la plankon. Unu palpo profunden post la muron, kaj jam li tenas en la mano fusilon. Ruĝa de peno, li ankoraŭ pli profunden sovas la manon en la kaŝejon, per fingropintoj li ĉasas, ĉasas, ĝis li sukcesas kapti pakajeton en vakstolo. Post kiam li ĝin diŝiras, ekkraketas kartoĉuoj. Unu, la duan, la kvinan kaj la sesan li enpoŝigas. Li ekzamenas la kulason, neklare brilantan de vazelino. Kaj jam li rapidas al la pordo, tenante ambaŭmane la fusilon, li impetas al atako. Nur sur la sojlo li konsciigas al si, ke tie estas ankaŭ Pepík. Li turnas sin al li, iomete

embarasiĝis, kvazaŭ li tenus en la mano objekton nekonvenan. Per ekkriego li venkas sian tutan honton antaŭ la flavbeka bubo :

"Kuru al la patrino kaj ne kuragu foriri el la hejmo, alikaze mi disrompos viajn krurojn !"

Kaj poste li subite estas for, ie en la trapasejo, sur la strato, diablo scias, kien li fakte malaperis. La genuoj de Pepik komencas tremi. Li elkuras el la metiejo. Sur la malnovurbaj turoj sonoriloj anoncas la tagmezon. Sur la mallarga strato estas amaso da homoj kun trikoloraj rubandoj, de ie el la fenestroj falas Hitler-portretoj. La pasantoj kun plezuro piedofrapas la fizionomion de la kanajlo. Alirilite malfacilas fari inter ili elekton : ili kondutas same kiel Pepik, entuziasme, konfuzite, ĝojkrias kaj interkisas sin kun knabinoj, ĉie nur ĝojo kaj nenia orda celo. Junaj kudristinoj reciproke sin embrakigas kaj komencas gaje kanti : "Kolín estas bela urb'".

Ku, diable, ĉi tia solvo ne estas la ĝusta. Konstante pensas Pepik pri sia patro kaj la fusilo. Nepre okazos interbatigo, la nazioj ja ne estas katidoj ! Pepik malfermegas la okulojn, kuras kun la amaso, ĝis la strato elsputas ilin sur la Nacian Avenuen. Sur la vojkruciĝo aperas SS-ano. Jen kiel se oni pafe atakus paserojn. La kudristinoj kuras sur la trotuarojn, dika sinjoro kaŝas kun kulpkonscia rideto la trikoloran rubandon. Unu mitraleto, kun tubo klinita al la pavimo, sukcesos prigardi la tutan gregon. Ĉu sukcesos ?

Sur la trotuaro paŝas karbisto. Nigra, tute kovrita de karbopolvero, surŝultre li portas sakon da koakso. Sen trikolora rubando, sen intereso. Ulo, kiu pensas nur pri sia pena laboro. La SS-ano allasas lin je kvin metroj ĝis si mem, eĉ lasas lin sengene transpasi la straton. Tiumomente li ankoraŭ duone sin deturnas, por kontroli la kontraŭan flankon.

Baŭc ! brufalas la sako sur la trotuaron. Terura salto. La granda, larĝaŝultra SS-ano falas kune kun la mitraleto surdorsen. Sur lia brusto kuŝas la nigra viro, premegante lian gorgon. Ĉapo kun bildigita kranio kuŝas sur la asfalto fund-alsupre, el la rugbruna vizago de la germano montrante elsovigas la okuloj. Ĉio ĉi daŭras nur kelkon da sekundoj. Poste la karbisto sin levas, en la dekstra mano tenas la mitraleton kaj krias :

"Viroj, sekvu min ! Ni iru por preni armilojn !"

Iu demetas sian palton. Li ĵetas ĝin en la brakojn de sia edzino. Alia forĵetas la tekon. Simple mezen de la strato. Ĝi, la aĉaĵo, malhelpus la kuradon. Ili ekkuras sesope, dekope, amase, grand-are. Pepik kun ili. Kaj kiel torento, kiu detruas la bordojn, ili kuregas returne en la Malnovan Urbon, deŝirante en sian fluon viron post viro. El la fenestroj oni krias al ili :

"La radiostacio vokas helpon ! Oni murdas tie niajn homojn !"

Tamen la nigra viro frontloke ne aŭdas, li kuras memcerte, portante la mitraleton en la gigantaj manoj. Eĉ se ili volus halti, eĉ se ili sin volus turni, la certeco de la karbisto ne lasas ilin. Devas lin sekvi eĉ tiuj, kiuj ne volas.

Pordego. La karbisto impetas en la nigran faŭkon, saltas sur larĝan ŝtuparon. La viroj lin sekvas. Estas tie mallumo, la piedoj saltas blinde, trafe-maltrafe. Kaj post kiam fine malfermiĝas duonlumo, ili ekvidas antaŭ si tri germanojn kun pistoloj. La mitraleto komencas bruegi. Ĉiuj oreloj subite surdiĝas, la nazotruoj estas plenaj de polvo el la stukaĵo. Kaj la piedoj, kiuj volas pluiri, kiuj devas fini tiun ĉi atakon, saltas sur iom da, senforma, sur sangaj talpmondetoj, kurbiĝantaj sub la plandoj.

Post kiam Pepik rekonsciigis, li ekvidis tridek soldatojn kaj oficir-ojn. Ili staras kun levitaj manoj ĉe la muro, survizage montrante timegon preskaŭ bestan. Iliaj rigardoj vagas sur la nigra malamika amaso, estante konsternitaj de timo pri la propra fino. Preskaŭ neniu atentis ilin. La karbisto kun la mitraleto trabatas la serurojn de la oficejaj ŝrankoj. Pis-

toloj. Pistoloj. Kaj fusiloj ? Nur ses. Ĉiun el ili klopodas ekposedi dek manoj. Viroj ĉeestas sennombraj. Kartocujoj migras el unu manplato en alian kiel kupraj moneroj, kiel salajro de taglaboristo. Neniu eĉ demandas pri la kalibro.

La manoj de Pepik estas ĉiam ankoraŭ malplenaj.

En la lasta ŝranko oni trovas longajn grizajn klabojn. La kapo aspektas kiel husana batalmartelo. Ĝi estas konata el kinorevuo. Kirasrompilo. La viroj rigardas tion embarasite. Neniu komprenas la manipulado. Pepik havas manojn terure malplenajn.

Kaj li devas ion havi, por kvietigi la subitan sovaĝan avidon pri armilo. Li donas al la viroj ekzemplon, li la unua etendas la manon al kirasrompilo. Same volonte li prenas bajoneton. Ion ajn. Nur ne havi malplenajn manojn. Li kuras kun sia ŝargo eksteren, estante spirilaca de feliĉo.

"Hura!" oni krias al ili renkonte. Fine ni kvitigos ankaŭ kun la germanaj tankoj. Kaj per ilia propra armilo ! De apud la fakultato jam priversas tanka maŝinpafilo la straton. Ĝi batdifektas la fasadon de Klementinum. Pepik transkuras sub pafado. Ha, tio estas ja bagatelo. Kuras ankaŭ kamarado kun ligna kruro. Kaj tamen li transpasas sana.

Germanoj komencis batalon. Paraŝutĉasistoj, monstroj en ŝprucmakula vesto, antaŭenmarŝas tra la strato. Trankvile kaj laŭmetode alpafas ilin la niaj el fenestroj, el veturkoridoroj, el post stratanguloj. Sur la maston de la kazerno, kie dum ses jaroj pendacis standardo kun hokokruco, hisiĝas flago ruĝa-blua-blanka. Malantaŭ tegmenta defluilo pafas embuskanto. Li malbone pafcelas, tri kugloj ekplaudas kontraŭ la masonaĵo, ne kaŭzante vundon.

"Pruntu al mi la aĵon!" diras tramvoĵisto, por kiu ne restis fusilo. Kaj dande, kun ĉapo ŝovita al la nuko, li ĝisatendas la sekundon, kiam la embuskulo vidigas la frunton. Poste li faras trafon inter la okulojn. Trankvile, kvazaŭ temas pri krajonsigno. La bandito sin streĉas, disĵetas la brakojn kaj tiam falas sur la trotuaron, turnigante en dekobla mortosalto.

"Ĉu ankaŭ paraŝutisto?" mokridas knaboj.

Kaj tankoj, tankoj, tankoj.

Sabate, dimanĉe, lunde. Iliaj dentoj elrompiĝas kontraŭ la barikadoj el pavimŝtonoj. Pepik Hošek ĉiam ankoraŭ trenas sian kirasrompilon. Al neniu li ĝin fordonas. Li maksimume elauskultas konsilon, kiel ĝin manipuli. Kaj poste...

Tri kirasrompiloj malantaŭ barikado. La unua havas tankon en kvardekmetra distanco. La viro fermas la okulojn, ekpremas la ĉanon. Malŝargo ne okazis. Li forĵetas la superfluan, sentaŭgan objektaĉon, timego saltas en liajn okulojn, li forkuras de la barikado kiel frenezulo, ne perceptante la maŝinpafilan pafadon, kiu siblas super lia kapo.

Poste pafas la dua viro. Je tridek metroj. Li sin apogas al muro de dome. Post kiam la pafado eksonis, oni trovas lin dispecigita. Raketflamo postulas liberan spacon. Kaj la tanko staras en dudekmetra distanco.

Pepik tremas de teruro. Li estas nur deksepjara. Mi disrompos viajn krurojn, se vi eliros el la hejmo, diris la patro. Se li ĉeestus nun, li ekkrius: "Mi disrompos viajn krurojn, se vi ne ekpafos." Kaj Pepik scias: eĉ ĉi-kaze, sen la patro, sen ordono mi ne fuĝus. Apud Berlino batalas deksepjaraj ruĝarmeanoj. Kaj generale, en la aĝo de dek sep jaroj oni estas jam viro. Li pafcelas. Pafcelas. Kaj dentoklakas. Kanajloj, kanajloj, kanajloj faŝistaj ! La lango mem tion diras. Tamen Pepik sentas tion per sia tuta korpo.

La tanko en dekkvinmetra distanco.

Maŝinpafilo bombardas la fronton de la barikado, granitaj fragmentoj flugas ĉiufanken. Pepik kaŭras malsupre, ĉe fendo destinita ĝuste por lia kirasrompilo. Ĉu ĉeestas ankoraŭ pafantoj ? Ĉu estas ĉi tie ankoraŭ iu ?

Li sentas sin terure sola. Terure respondeca por tiu ĉi momento. Li ekpremas la ĉanon. En tiu sekundo forlasas lin ĉiuj sensoj. Surda li estas, blinda, sen perceptkapablo, sen palp-kaj flarsento.

Nur post kiam oni alkuras al li el la domo, kiam oni lin ĉirkaŭbrakas kaj kisas, li vekigās. Ĉu li staras? Ĉu kuŝas? Ĉu li ne estas disportita je mil pecoj? Ho ne, li kaŭras kiĉel unuaklasano, pinĉludanta en printempo per faboj. La tenilon li ankoraŭ firme premas subbrake.

Oni levas lin al si, starigas lin sur la krurojn, iu entuziasme frapegas lian ŝultron: "Rigardu, vi flavbekulo! Rigardu!"

Nur nun li ekvidas la feran fibeston. Ĝia ventro estas disŝirita, levigās el ĝi fumo, malpeza benzina flamo lekas la metaltabulojn. Fluso de entuziasmo malfrostigas Pepikon Hošek, li tute degelas sub la amikaj manoj de viroj. Ilia arda korfavoro eĉ preskaŭ mortpremus lin.

Pepik forĵetas la malplenan tenilon. Ankoraŭfoje li rigardas la buĉitan monstron. Poste li ekkraĉas, malfermegas la blujn bovidecajn okulojn kaj, preskaŭ sufokigante de feliĉo, eksingultas:

"Mil diabloj ... jen kia ... perfekta trafo!"

El la ĉeĥa tradukis Miloš Lukáš

Ján Drda /4.4.1915/, famekonata ĉeĥa verkisto, iama prezidanto de la Ligo de ĉeĥoslovakaj verkistoj. Sian unuan romanon li aperigis en 1940. Unu el la plej konataj libroj de Drda estas kolekto de noveloj "Muta barikado", inspirita de heroo kontraŭnazia batalo de la ĉeĥa popolo dum la dua mondmilito.

Laŭ la Esperanta manuskripto de Miloš Lukáš kaj Imrich Zálupský tradukis la novelaron en 1956 s-ano Li Laojon en la ĉinan lingvon.

BELETRA ALDONO DE STARTO BELETRA ALDONO DE STARTO BELETRA
Aperis okaze de la 25-a datreveno de liberigo de Ĉeĥoslovakio

/Somera bilanco-daŭrigo/

ciala danc-amuzo por infanoj de 5 ĝis 20 kaj eĉ pli; enirpago por ĉi tiu amuzo estis 1 kandelo popersone. /Fx/

10-a jubilea renkontiĝo en Po-debrady. Ĉeestis esperantistoj el CSSR, Pollando, Hungario, GDR, Jugoslavio, Aŭstrujo, GFR, Nederlando, Danlando, Svedujo. Atenton meritas la poezia kaj folkloro vesperoj.

Somera lernejo de Esperanto - okazis dum julio en Dudince. Aliĝis 75 samideanoj, inter ili hungaroj kaj poloj. La lernejo havis tri kursojn; por komencantoj, progresintoj kaj instruistoj.

Antaŭkongreso en Bratislava /29-31.7/. En ties kadro okazis kongresoj de AE SSR kaj ĈSEF.

PROSPEKTON PRI PARDUBICE - en Esperanto - petu ĉe ER ROH Dukla Pardubice aŭ J. Andres, Jiráskova 1997.

INTERESAN INTERVJUON kun 80jara R. Kaplerová el Brno kaj J. Šupichová elsendis Radio Praha 25.8.1970.

Kalendář kulturních, politických a vědeckých výročí na rok 1971 vydá koncem letošního roku Ústav pro výzkum kultury/Praha 1, Maltézské nám.1/ a rozešle pouze na adresy zájemců, kteří se k jeho odběru přihlásí. Na výtisk za 7Kčs zaslě vydavatel složenku.

La Ĉarto de U.N. aperis okaze de la 55-a UK. Eldonis CED, ofsetita, 93 pĝ.

"Estrado de animaloj", poemokolekto de M. Jakubcová. Hav-eblo ĉe A. Váňa, Dudince, distr. Zvolen.

Forpasis Anton Balague

La 13-an de majo mortis la fondinto de Mondpaca Esperantista Movado, entuziasma adepto de la nobla paca ideo - Anton Balague el Aŭstrujo.

Li, kune kun kelkaj aliaj kamaradoj, staris antaŭ 17 jaroj ĉe la lulilo de tiu ĉi grava internacia movado. MEM dum sia ekzistado sukcesis kunigi milojn da adeptoj de la paca ideo en pli ol 40 landoj. En multaj el ili estis establitaj landaj sekcioj kaj komitatoj.

La esperantistaro en nia respubliko kun profunda funebro rememoras la eminentan forpasanton, kiu ĝuste al la ĉs. Esperanto-pacmovado dediĉis apartan simpatian kaj ĉiuflanke helpis ĝin.

Tomáš Balda
prezidanto de Ĉs. MEM-sekcio

KONGRESAJ TAGOJ EN OSAKA


Proksime de la mondekspozicia urbo, en Takacuki, okazis la 25-26an de julio la 57-a kongreso de japanaj esperantistoj, sub aŭspicio de la urbestro ĉeestinta la solenan inaŭguron. Kiel reprezentanto de ĈEA prezentis salutparoladon la aŭtoro de ĉi tiuj linioj, kiu tiutempe restadis en Japanujo.

S-ano Takeuti, kongresa sekretario, en sia festparolado pledis precipe por unueca organizaĵo de la japanaj esperantistoj; en Japanujo nome ekzistas du E-centroj, en Osaka kaj Tokio. Dutagan traktadon partoprenis preskaŭ 600 delegitoj.

Unu semajnon antaŭ la japana kongreso aperis en Yomiuri Simbun, granda japana ĵurnalo, artikolo de s-ano Kei Kurisu, en kiu li, surbaze de la informoj en STARTO, raportis pri la lastaj eventoj en nialanda movado.

O. Kníchal

LINGVA KONSILANTO



Enkonduka ĉapitro
aŭ

pri la korekteco en la lingvo.

Venis al ni longa letero de diligenta leganto; li demandas, kio en la lingvo Esperanto estas ĝusta, korekta, kaj kio estas malĝusta, malkorekta. Li antaŭmetas kelkajn demandojn el la gramatiko, kiuj ŝajnas al li dubindaj. Ni provos respondi ilin iom post iom. Hodiaŭ ni volas rigardi la problemon el iom pli alta vidpunkto kaj konsideri, de kie fontas la "korekteco" en lingvoj.

Ĉe la naturaj gentlingvoj temas pri tradicio, kreiĝinta dum jarcenta lingvopraktikado en la buŝoj de sinsekvantaj generacioj. Tiel estiĝis lingvoj neunuecaj, nekonsekvencaj, ĉiam pli dialektiĝantaj. Kiam la kulturo de la popolo kreskis kaj maturiĝis, aperis homo aŭ homoj kun sufiĉe vasta aŭtoritato, kies lingvon oni rigardis kiel modelan: estis iu fama verkisto, renomlingvisto, kaj lastatempe eĉ oficiale rekonita instanco /ekz. Akademio de sciencoj/, kiu selektis, sistemigis kaj preskribis la normojn de "korekta" maniero de parolado, prononcado, skribado. Komparu en nia lingvo gepatra la konatajn "Pravidla českého pravopisu" - la Regulojn de ĉeĥa ortografio, eldonitajn de nia Akademio.

En lingvo laŭplane konstruita tiu kompetenta aŭtoritato estas la volo de la lingvoaŭtoro, al kiu subĝigas la adresatoj de la normo, t.e. la lingvouzantoj. Ĉio estas afero de konvencio: kiu volas skribi en volapük, devas akcepti la regulojn de ties inventinto prelato Schleyer; alie li ne skribas en volapük.

Kiel statas la afero pri Esperanto? Zamenhof kreis la lingvon, sed tuj en la komenco li rifuzis ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn, tiel ke Esperanto fariĝis "nenies propraĵo", nek en rilato materiala, nek en rilato morala. Kaj ĉe la unua Kongreso, en Bulonjo ĉe Maro 1905, en ties lasta laborkunsido la 9-an de aŭgusto, estis akceptita la "konstitucia leĝo" por ĉiuj lingvouzantoj, la fama DEKLARACIO PRI LA ESENCO DE LA ESPERANTISMO. Ni citu el ĝi la plej gravan paragrafon 4, kiu tekstas:

"Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniun aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj per neniun devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo Fundamento de Esperanto, en kiu neniun havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto. Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la Fundamento de Esperanto, ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu

alia lingvo. Sed pro la plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton."

Daŭrigote.

Tomáš Pumper

KURS ESPERANTA vysílá od 14. září Slovenský vysílač VKV Bratislava. Vysílací časy jsou určeny takto :

Pondělí	10,45 - 11,00
Pátek	10,45 - 11,00
Sobota	8,30 - 8,45

Skripta zašle ZE SSR, Vlčková 46, Bratislava.

BAREVNÉ FILMY 16 mm v esperantu - "Fiat 130" /170m/a "Operacio Sekureco"/216m/ - si můžete zapůjčit k promítání i ve vašem klubu. Na předem dohodnutý termín a za úhradu režijních poplatků /poštovné, clo atd./ 20 Kčs za jednu zásilku vám je dodá L. Křivánek, Zborovská 1332, Písek.

Re c e n z o j

KIO ESTAS MEM - publikaĵo, kiu klarigas la esencajn celojn de Mondpaca Esperantista Movado, ties statuton kaj regularon. Artikoloj de eminentaj funkciuloj traktas diversajn aspektojn de la porpaca aktiveco esperantista. La broŝuro estas ekstra represo de la aldono de la ĉs. eldono de PACO n-ro 173, aprilo 1968 sub la redakto de T. Balda. Ĝi estas havebla ĉe ĈEA por Kčs 2.

CESTA DO ŠPANĚL /Vojaĝo al Hispanujo/ de d-ro R. Horský -

eldonis Grafia Brno, ilustraĵoj F. Rydval. Interesa ĉeflingva priskribo de la lando kaj ties ekonomia, politika kaj socia vivo. Riĉe ilustrita 63-paĝa libreto. Aĉetebla ĉe EK Praha kaj ĈEA kontraŭ 7 Kčs + poŝtelspezoj /1 Kčs /.

KVINMILFOJE EL VARSOVIO

La 4an de aprilo 1959 unufoje aŭdiĝis en la etero la anonco: "Parolas Varsovio-naskiĝurbo de Esperanto!" La 20an de aŭgusto matene la Pola Radio disaŭdigis jam la 5000-an elsendon en la internacia lingvo! La jubileo fariĝis nun okazo por aranĝi malgradan enketon inter ĉiuj esperantistoj - depost la 20-a de aŭgusto ĝis la fino de la nuna jaro. La E-Redakcio disaŭdigas en la programero "Leterkesto" respondojn al jenaj demandoj:

- 1/ Kion donas al vi la E-elsendoj de la Pola Radio?
- 2/ Kian signifon por la E-movado kaj por vi persone havas la E-elsendoj de la PR?
- 3/ Ĉu dank'al la elsendoj kreskis via scio pri la naskiĝlando de Esperanto?

Oni respondu al: Pola Radio, Esperanto Redakcio, Varsovio 1, pk. 46, Pollando.

Renkontiĝo en Rostock. Esperantistoj vizitintaj GDR okaze de la ĉijara Semajno de la Balta Maro en Rostock /12-19.7./ ĉeestis amikan renkontiĝon la 11-an de julio en la klubo de la Germana Kulturligo.

Soveta Uzbekistano, n-ro I, eldonis Uzbeka Asocio de Amik-eco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj, Taŝkent 1970. Preparis por eldono P. Poliŝĉuk kaj I. Kovalevskij.

ESTONIA SSR - Kun gejunuloj el ĈSSR : Rita Saukas, 18-jara, Pälsoni 23-214/p.m., muziko/ • Koit-Eduard Konstabel, 21j., H.Heidemani 5-1 /numismatiko, muziko, p.m./ • Edda Tenson, 18j., Pälsoni 23-214 /muziko, p.m./ • Heino Luiga, 19j., Leningradi mnt. 89-533 /literaturo, p.k./ • Jaan Kõiv, 20j., Leningradi mnt. 89-420 • Arvi Seeba, 24j., Pikk 74a-7 /alumetetiketoj, p.m./ • Ilmar Kirjanen, 19j., Leningradi mnt. 89 /filatelio, muziko, kinematografio/, ĉiuj el TARTU • Lehho Jõumees, 20j., Mõisaküla, Kiikre 16-1/"beat"-muziko, kol.p.k./ • Ülo Rood, 20j., Tsooru, Võru /grafiko, lingvoj, kolektado de sondiskoj./

Korespondi deziras

UKRAINA SSR - 100 gestudentoj ŝatus kor.kun ĉeĥaj junuloj. Adr.: SSSR, Kiev 30, p.k.644, Lineckaja Margarita.

POLLANDO - Władysław Stasiów, 32j., skr.poczt.NR 518, Kraków 1 /p.m., b.k./

GDR - Erika Krüger, 18j., 1901 Damelack, Post Breddin/geaktor-oj, b.k., p.m./

RODEZIO - Stephen S.Sibanda, Elias Togara kaj T.D.Moyo, Gonakudzingwa Restriction Area P.B.U. 304 Bulawayo.

Korespondemuloj, kiuj deziras interrilatiĝi kun italaj gesamideanoj kaj lasi senpage aperigi korespondanoncon, skribu al direktoro de "La Lingua Internazionale Esperanto", prof. Corrado Cerri-Calzoni, Casella Postale 159, I-13051 Biella, Italujo.

EL NIA LETERKESTO "Mi kun intereso tralegis la 1-an kaj 2-an numerojn de Starto..." /Nikola Aleksiev, Sofio/ - "Kun plezuro mi legis STARTON. Ĝia enhavo estas bone mezurita, la lingvo korekta, la paĝigo kvankam modesta, moderna kaj plaĉa." /Tibor Sekelj, Beogrado/ - "Kiel bohemisto mi ĉiam kun granda atento kaj intereso sekvas ankaŭ Esperantan movadon en via lando, do mi estus feliĉa, se vi bonvolus daŭre sendi al mi vian organon." /Kei Kurisu, Tokio/ - "Plezure mi akceptis .. ĉu numerojn de via interesa kaj agrabla revuo. Kun granda atentomi ilin tralegis." /N.Kavenius, Turku/ - "Ni estas bone informitaj, dankon same ankaŭ por la pli bona kvalito." /S.Kareš, Miletín./

Ricevitaj periodaĵoj.	Bulgara Internacionale Esperanto, 1-2 = Esperantisto, 1-6/1970 = Esperanto Gazeto, 37-38 = La Suda Ste-lo 1-3 = Der Esperantist 1/70 = Franca Esperantisto 5-6 = Interlingvistika Informa Servo, 2 = Kvakera Esperantisto, 64 = Esperanta Finlando, majo = Esperantisto Slovaka, 3 = La Lingua	Internacionale Esperanto, 1-2 = Internacia Turisto, aprilo = Universala Revuo, 38 = La Skolta Mondo, 6 = Bulteno de la AFEF, 6 = Zpravodaj sekce esperanta při námětové komisi Svazu českých filatelistů, 2 = Cirkulero de Pedagogia sekcio de ĈEA, 2, 3 = Verda familio, aprilo.
-----------------------	--	---

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio - vydává Český esperantský svaz, Praha 2, Blanická 4, aperas dumonate-vychází každy druhý měsíc, rediguje - redaktas O.Kníchal kun red.komitato - s red.radou : Ing.E.Felix, J.Mařík, Ing.F.Sviták.